

# KATALUNA ESPERANTISTO


OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 317 (84) KVINA EPOKO

JULIO-AŬGUSTO 2001

# 1000

JARA NASKIĜDATREVENO  
DE  
SALVADOR GUMÀ I CLAVELL



(legu omaĝan programon sur paĝo 4a)





ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio  
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj  
Internacie (ne)Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, *Kontakto* kaj libroj), FEL  
(revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La  
Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca  
Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: (+34) 93 716 36\*33 (ekde  
lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)...

Ret - adreso: [kea@stel.net](mailto:kea@stel.net)

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

**Kotizoj por la jaro 2001:** Individua Abonanta Membro 3 500  
p-toj; Individua Subtenanta Membro 7 000 p-toj; Individua  
Dumviva Membro 70 000 p-toj; Kolektiva Membro 7 000 p-toj;  
Juna Membro 2 500 p-toj.

**Banko:** Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència  
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA:** Prezidanto: Neus Moly;  
vicprezidanto: Josep Franquesa; kasisto kaj provizora  
sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Mercè Porta, Roger  
Prieto, Anna Casasús.

**Kontrola Komisiono:** Mikel Altuna, Arnald Massanas, Lluís  
Armadans.

**Kataluna Esperantisto:** Llibert Puig, Marina Ollé.  
Revizianto: Hektor Alos i Font.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre  
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj  
ĝianome.

**Kataluna Esperanto-Junularo:** Apartat 32.318 - 08080  
Barcelona

**Impres a/Presita ĉe:** Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
**Dipòsit Legal:** B-27362 - 1982

## CLARA VELA I GUASCH

Ŝi naskiĝis la 7an de marto 2001. Ni  
gratulas la feliĉajn gepatrojn Carles Vela  
kaj Meritxell Guasch, geavojn kaj  
ceterajn familianojn.

## KLOKOTNICA

Kun plezuro ni recenzas la aperon de tutkolora  
informilo pri la fino de la projekto, kiun la  
magistrato de Sant Quirze del Vallès plenumis  
en la bosnia vilaĝo Klokotnica. La projekto,  
prilaborita de Espero-Sarajevo (esperantista  
organizaĵo, kiel konate), celis la totalan  
rekonstruon de la akvo-reto de la menciita  
vilaĝo. Espero-Katalunio kunlaboris pri la ĉi-  
flankaj kontaktoj kaj la traduko de la tuta  
materialo ricevita el Sarajevo.

La informilo estas 8-paĝa tutkolora en formato  
DIN A-4 kaj la salutvortoj de la urbestro de  
Sant Quirze kaj de la bosniaj aŭtoritatuloj  
aperas trilingve: en la kataluna, en la bosnia  
kaj en Esperanto.

Jen imitinda solidareca ekzemplo pri la  
praktika uzo de nia lingvo.

## PERE SAUMELL I VILA (1918-2001)

Nia kara samideano el Manresa forpasis la  
27an de majo ĉi-jara. Tre kortuŝite ni  
kondolencas lian edzinon Lola Estrada kaj  
ceterajn familianojn. Liamemore la edzino  
verkis tre senteman poemon, kiun ni sekve tre  
volonte reproduktas:

Com un ocell  
Com un ocell  
has passat  
i en el teu pas  
has deixat  
un remoreig  
endolcit  
que al meu cor  
ha colpít.  
Encisera  
il·lusió  
que m'omplés  
d'esperança  
i guardes  
dins el cor  
el flam encès  
d'un bell record!

Pace ripozu nia estimata kaj neforgesebla  
amiko.



## KONGRESA INFORMILO

Ni memorigas al vi, ke la kolektivaj dimanĉa bankedo kaj vendreda kaj sabata tagmanĝoj okazos en la sama restoracio BAR/BAU ĉe Plaça Catedral, 8 (Katedrala Placo, 8) en la klasika konstruaĵo "Pia Almoína".

La kolektivaj vespermanĝoj estis nuligitaj de la programo; tial ĉiu kongresano mem zorgos.

Vegetarana menuo disponeblas, se oni ĝin antaŭmendas en la aliĝilo.

Por pritrakti la kongrestemon, konfirmiĝis la ĉeesto de István Ertl, redaktoro de la revuo *Esperanto* de UEA.

Traurba gvidata vizito okazos dum la Kongreso.

## MAJORKO

La grupo *Majorka Esperantistaro* sendis donace por nia Biblioteko la belegan omaĝan volumon, kiun eldonis la tiea Universitato memore al la eminentulo *Joan Mascaró i Fornés* (1897-1987), mem esperantisto. La 268-paĝa libro enhavas krom la prezentajn paĝojn, plurajn artikolojn de la omaĝito, 29 diversaŭtorajn kontribuaĵojn (inter ili du de niaj gesamideanoj Elisabet Abeyà kaj Xavier Margais), biografiajn informojn (kun mencio de liaj ĉefaj esperantistaj agadoj), bibliografion kaj reprodukto de kvar prelegoj.

## REUS

Dimanĉon la 30an de septembro okazos tie unika evento. Nia asocio organizas solenan omaĝon por festi la 100-jaran naskiĝdatrevenon de nia kataluna dojeno **Salvador Gumà i Clavell**. Ni invitis ne nur niajn membrojn, sed ankaŭ ĉiujn hispanajn samideanojn tra Hispana Esperanto-Federacio. En la nuna momento aliĝis al la festo nia kolega asocio Kultura Asocio Esperantista. Ni esperas, ke la reago al nia invito estos granda, ĉar tio certe feliĉigos nian karan omaĝoton.

Ni preparis brilan programon, kiun vi povas legi aparte en ĉi tiu sama revuo.

## SABADELL

Dum la lasta semajnfino de septembro okazos en la tiea urbodoma placo<sup>1</sup> la 4a Foiro de Asocioj, kie nia loka grupo Centro de Esperanto Sabadell (CES) partoprenos per propra budo. La inaŭguro okazos vendrede la

28an je la 19a h. kaj la Foiro daŭros la tutan sabaton 29an kaj dimanĉon 30an. Ĉi-foje CES prezentos panoramon de la kulturaj valoroj de nia lingvo, ĉar la neesperantista publiko tute ne konas la atingojn de Esperanto kaj supozas, ke nia lingvo ne kapablas krei ilin. Jen malofta okazo por diskonigi la evoluon de Esperanto kaj pruvi, ke ĝi estas vivanta esprimilo de progresema komunumo.

Ni invitas ĉiujn katalunajn gesamideanojn viziti nian budon en Sabadell. Vi estos ege bonvenaj.

<sup>(1)</sup> La urbodomo de Sabadell situas tre proksime de la Rambla-stacidomo (per la trajnlinio de Generalitat).

## VILANOVA I LA GELTRÚ

Sabaton la 7an de julio okazis en nia bela marborda urbo populara festo, kie partoprenis pluraj neregistaraj organizaĵoj, inter ili la loka Esperanto-grupo. Ties budo prezentis interesan ekspozicion de libroj, revuoj, kompaktdiskoj kaj oni distribuis informilojn al la scivolemaj preterpasantoj (vidu foton). La loka grupo ankaŭ prezentis internacian gastronomian pladon, kiun la ĉeestantoj gustumis tre kontente. La kataluna muzikteamo *Kaj Tiel Plu* koncertis je ĉies ŝato laŭ la kontrolo de la aplaŭdometro.



Elstaras la fakto, ke la oficiala programo de la festo, eldonita de la magistrato, estis rekte sendita al ĉiuj niaj membroj.

Evidentiĝas la lastatempa kutimo organizi similajn foirojn en diversaj katalunaj urboj (memoru lastatempe en Sant Andreu de la Barca, nun en Vilanova kaj baldaŭ en Sabadell); tiajn iniciatojn ni devas nepre atenti kaj partopreni. Finfine temas pri malmultekostaj okazoj diskonigi nian movadon. Niaj membroj en diversaj urboj nepre atentu pri la okazigo de tiuj Foiroj kaj plej baldaŭ informu la KEA-estraron.



# NIA AGADO

## PROGRAMO 100-JARA NASKIĜDATREVENO SALVADOR GUMÀ I CLAVELL.

En Centre de Lectura - Major, 15, Reus

12 h.

Bonveniga saluto  
Laŭda prelego  
(muzika paŭzo)

13 h.

Premiera prezento de noveldonita  
libro de la omaĝato.  
Livero de donacoj  
(muzika fino)

14 h.

En Restoracio "Celler del Raïm"  
Raval St. Pere, 10 - 21  
Kolektiva bankedo, laŭ jena menuo:

1a plado

Entreteniments

2a plado (elekti unu inter la  
jenaj)

a) Lluç a la marinera

b) Confit d'ànec amb peres i  
prunes

c) Jarret de vedella a la  
jardinera

d) Bacallà amb panses i piñons

e) Parrillada de carn a la brasa

f) Corder al forn

Postres i pastís d'aniversari

Aigua, vi, xampany i cafè

(Neta prezo 4.000 p-toj)

---

(Faru vian bankedan rezervon rekte al Luz Vázquez tel. 977 855253 kaj e-poŝto  
lvazquez@pie.xtec.es **kun nepra mencio pri la dua elektita plado** antaŭ la 25a de  
septembro)

## RESUMA BIOGRAFIO DE LA OMAĜOTO

Salvador Gumà naskiĝis en Alcover en la jaro 1901, sed de longe loĝas en Reus. Lerninte Esperanton en la jaro 1917 en kurso gvidata de Antono Bohigas, li profunde kaj persiste flegis la lingvon per senĉesaj verkado kaj prelegado. Dum 38 jaroj li korektis la bultenon de Hispana Esperanto-Federacio kaj dum pluraj jaroj li estis ĵuriano de la Katalunaj Floraj Ludoj.

De la jaro 1921 ĝis nun li ĉeestis diversajn internaciajn kaj naciajn kongresojn. Menciindas, ke li rilatis kun gravaj esperantistoj, interalie kun: Lanti, Waringhien, Régulo Pérez, Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Sebastià Alberic, Julio Baghy, Ivo Lapenna, E. Drezen, P. Stojan, Krestanov, Barthelmes, M. Vermaas.

Tutcerte li estas nia esperantista dojeno kaj li meritas, ke lia interesa biografio aperu broŝurforme. Jen defio por niaj historiistoj.



Ĉi-jare la UK. okazis en Zagrebo kaj en la renovigo de la estraro de UEA, farĝis prezidanto la itala aktivulo Renato Corsetti, ĝis nun ties vicprezidanto. KEA gratulas lin pro lia enposteniĝo kaj deziras al li la plej grandan sukceson en lia nova tasko.

Ĉiuj esperantistoj certe scivolas pri la pensoj de la nova UEA-prezidanto kaj tial ni reproduktas la intervjuon aperintan ĉi-junie en la revuo *Brazila Esperantisto*:

**BE.** *Esperanto estis iniciatita en Eŭropo, UEA-sidejo staras en Eŭropo, oni kongresas internacie plej ofte tie, nia literatura tradicio estas esence eŭropa, kaj ankaŭ gravaj skoloj kaj manifestoj influantaj la movadon. Ĉu Esperanto estas eŭropa lingvo?*

**Corsetti.** Ne eblas nei, ke Esperanto estis iniciatita en Eŭropo, sed same ne eblas nei, ke unu el la kaŭzoj de la ekesto de Esperanto havas rektan kunligon kun la malkovro de Ameriko. Nia historio, de ni favorantoj de internacia planlingvo, fakte komenciĝas en la jaro 1492a, ĝuste en la jaro de la malkovro de Ameriko. En tiu jaro oni aperigis la unuan iam ajn aperintan lernolibron de "popola" eŭropa lingvo, la hispana. Hispanujo, kiu gvidis la malkovron de Ameriko ankaŭ gvidis la firmiĝon de la grandaj naciaj lingvoj de Eŭropo. Ĝuste reage al tiuj kaj al la sekva dividiĝo de la eŭropaj kleruloj, oni komencis pensi pri internacia lingvo. La rezulto plej konkreta de tiu pensado estas Esperanto.

La administra sidejo de UEA estas en Eŭropo, kvankam ne mankas malgranda oficejo en Nov-Jorko, sed la vera sidejo de UEA estas en Tuluo, Kolombio, kaj en ĉiuj Tuluoj de Ameriko. Tie, kie oni malgraŭ ĉiuj malgraŭoj sukcesas starigi Esperanto-grupon kaj daŭrigi ĝin, tie estas nia sidejo.

Pri tio mi ne akceptas refutojn kaj kontraŭargumentojn. Militojn oni faras en la fronto kaj ne en la oficejoj de la generaloj. Estas nur bedaŭrinde ke niaj "generaloj" tre malmulte, se entute ion, sukcesas fari, por helpi la soldatojn ĉe la fronto.

Vi parolas pri literatura tradicio kaj pri manifestoj, sed la afero ne estas tiom simpla. La tiel nomatan Manifeston de Prago iniciatis kanadano, kaj se vi volas trovi la puran esperantisman spiriton de niaj komencaj jaroj vi devas nur vagi tra centra kaj suda Ameriko, kie hom-amoro kaj idealismo estas multe pli disvastiĝintaj ol komputiloj. Aliflanke, se vi serĉas komputilojn kaj sciencajn universitatajn studojn pri Esperanto kaj interlingvistiko, vi devas rigardi al Usono, ne aliloken.

Unuvorte Esperanto estas multe pli amerika ol eŭropa, ĉar ĝi estas la enkorpiĝo de la ideo, ke surbaze de la malnova eŭropa tradicio oni povas konstrui ion pli bonan por la homaro.

**BE.** *Kie ekster Eŭropo la kampo montriĝas pli fruktodona? Kaj kiel UEA partoprenas – aŭ planas partopreni – la klopodadon de landaj asocioj en tiuj regionoj?*

**Corsetti.** Eble tio surprizos vin, sed ekzistas stranga ekvacio: Esperanto prosperas en la plej malfacilaj viv-kondiĉoj. Vi eble aŭdis la rakonton pri tio, ke la plej multajn membrojn la Kopenhaga Esperanto-grupo havis dum la periodo de germana okupado dum la dua mondmilito. Tuj kiam la milito finiĝis la membro-nombro komencis fali.

Ĉiukaze, por alfronti vian ĝeneralan demandon, efektive la riĉaj nordaj landoj ne prezentas tre fruktodonan grundon. Tie homoj estas tro riĉaj kaj plene okupataj konsumi sian riĉecon. Okupiĝas pri idealaj aferoj nur malgranda ondo de la socio.

En sudaj landoj intereso pri revolucioj, pliboniĝo de la situacio kaj Esperanto estas ege pli ganda. Mi donu al vi alian ekzemplon: UEA aperigas anoncon en revuo de la londonaj flughavenoj legataj de milionoj da traflugantaj homoj, supozeble bonstataj. Venas unu aŭ du informpetoj. UEA aperigas anonceteton tre malgrandan en araba ĵurnalo. Venas centoj da informpetoj.



# INTERNACIE

Ĝenerale mi diru, ke Afriko, Azio kaj Suda Ameriko estas nun la landoj de nia estonteco. Tien fluas la ĉefa helpo de UEA. Agadeto komenciĝas ankaŭ en Oceanio, sed temas pri la vere unuaj burĝonoj.

Se temas pri landaj asocioj, mi kredas, ke sudamerikaj landaj asocioj (kaj ĉefe la brazila) devas komenci kompreni siajn respondecojn por la tuta kontinento. UEA, en ĉi tiu kazo la Amerika komisiono de UEA, certe pretus kapti la help-oferton, kaj ekzemple, starigi amerikan oficejon en la oficejo de BEL, de kie oni impulsos la agadon al la tuta Suda Ameriko.

*BE. Nu, se post simpla anonco en araba ĵurnalo svarmo da informpetoj invadas la UEA-oficejon, kaj se ĝenerale nia afero plej bele floras en la de vi nomataj regionoj de nia estonteco, ni povas konkludi, ke UEA havas decidigan laborprogramon por tiuj regionoj. Kio pri tio?*

**Corsetti.** Efektive UEA, eble la estraro de UEA, havas la intencojn, sed oni devas kompreni, kiu estas UEA en ĉi tiu kunteksto. Mi kredas, ke UEA estas ĉefe la kontinentaj aŭ regionaj komisionoj. La komisiono de UEA por Ameriko certe devas esti la unua impulsanto, kiam temas pri disvastigo de Esperanto tra Ameriko, kaj tiel mi diris supre la lokaj fortaj landaj asocioj devus esti la praktikaj realigantoj aŭ helpantoj por la realigado. Oni ne atendu, ke la Centra Oficejo en Roterdamo disvastigos Esperanton tra Paragvajo, se amerikanoj mem ne faras tion.

*BE. Kian rolon ni atendu de UEA sur la kampo de praktika aplikado de Esperanto?*

**Corsetti.** En la strategia laborplano aprobita en Zagrebo tuta sekcio estas dediĉata al la praktika aplikado. Efektive Esperanto iĝos normala lingvo, kiam per ĝi eblos aĉeti kamionon aŭ plenumi aliajn normalajn viv-bezonojn. Niaj fakaj asocioj devas esence fortiĝi. Tio, kion UEA povos fari, estas kunligi kaj instigi ilin. Tion ni certe intencas fari.

*BE. Kion vi opinias pri la Manifesto de Prago?*

**Corsetti.** Ĝi estas laŭ mi la esenca ideologia dokumento de la movado en ĉi tiu periodo. Ĝi klarigas kial la peno por disvastigi Esperanton estas samtempe peno por pli bona mondo.

*BE. Vi estas patro de du denaskuloj. Kion vi opinias pri tiu sperto? Ĉu vi ĝin rekomendas?*

**Corsetti.** Tre interesa sperto. Esperanto, kiam ĝi estas familia lingvo, iĝas vera lingvo, kiun oni uzas por ĉiutagaj bezonoj. Ĉu ne estis Zamenhof mem, kiu diris, ke 200 familioj uzantaj Esperanton ĉirkaŭ la vespermanĝa tablo faros por la lingvo pli ol 200 akademianoj debatantaj pri la ebla formo de plej perfekta lingvo internada?

Mi certe rekomendas al ĉiuj, kiuj povas fari tion. Ne timu pri tio, ĉu la infano same bone lernos la nacian lingvon. La nacia lingvo estas tiom pli forta ol Esperanto, ke ĝi zorgas pri si mem. Cetere sciencaj studoj pri dulingveco daŭre montras, ke dulingvuloj estas perfekte normalaj estaĵoj, foje eĉ en kelkaj fakoj superaj al unulingvuloj.

*BE. Estas sciata, ke en Brazilo la spiritistoj estas la plimulto en la Esperanto-movado. En Japanio oomotanoj certe abundas kaj la katolikoj verŝajne estas plimulto en Italio kaj tiel plu en la diversaj landoj kie Esperanto vivas. Kiel devas agi la Esperanto-gvidantoj de la neŭtralaj organizaĵoj antaŭ la religiaj grupoj, kiuj okulfrape kaj plene apogas Esperanton?*



## INTERNACIE

**Corsetti.** Laŭ mi kun kontento. Mi persone alianciĝus eĉ kun la diablo por disvastigi Esperanton, kial ni ne alianciĝu kun Dio? Preter la ŝerco mi volas diri, ke se homoj de difinita religio pretas apogi Esperanton, ili faru. La neŭtrala organizaĵo devos garantii ankaŭ al homoj malsamopiniantaj esti membro kaj profiti de Esperanto, kaj certe ĝi ne devas alpreni neneŭtralajn starpunktojn, sed preter tio mi ne vidas grandajn problemojn. Universaleco kaj toleremo estas du grandaj valoroj de la Esperanto-movado. En tiu senco, ekzemple, se en Pakistano la publiko estas dividita en du partoj: rigoraj islamanoj kaj laikuloj, eblas esti esperantisto kaj aparteni al unu el la du partoj. Kompreneble estus preferinde, se pakistanaj esperantistoj ne utiligus nian lingvon por ideologiaj bataloj prireligiaj inter si, sed provus disvastigi Esperanton al siaj neesperantistaj samkredantoj. En la longa daŭro tiuj, kiuj sukcesas konvinki pli da homoj, gajnos.

**BE.** *Unu el la lastaj novaĵoj en Esperantio estas la tiel nomata Civita Pakto. Kio pri ĝi?*

**Corsetti.** Nu, ĉiuj en Esperantujo rajtas fari ĉion per Esperanto. Kelkaj, kiel la esperantistoj en UEA kaj ĉirkaŭ ĝi, pensas, ke ili volas transdoni Esperanton al la mondo, alivorte, ke ili volas plibonigi la mondon pere de Esperanto. Tio postulas socian konscion, interesĝon pri tio, kio okazas en la mondo, kaj misiistan konscion, alivorte oni devas agi por la bono de aliaj, en niaj kazoj por la bono de neesperantistoj, kies homaj lingvaj rajtoj estas ĉiutage malrespektataj, kaj kiuj ne konscias pri tio.

Tamen, ekzistas ankaŭ esperantistoj, kiuj kontentiĝas pri la Esperanto-mondeto, kaj volas krei kulturon nur ene de ĝi kaj por ĝiaj anoj. Iusence ili diras: "La mondo ne interesĝas pri ni. La mondo iru al la diablo! Ni havas nian literaturon kaj ni legos niajn poemojn por ni mem. Ni havos nian flagon kaj nian registaron ktp."

Mi ne povas diri, ke ili ne rajtas fari tion, mi nur diras, ke tio esence estas troa malmulto rilate al la "eterna sonĝo de la homaro".

**BE.** *Certe vi estos la nova prezidanto de UEA, laŭ cirkulantaj informoj. Kiel aktivus nia monda asocio sub via gvidado. Kiuj estos la prioritatoj?*

**Corsetti.** La fakto, ke mi estos la prezidanto iom terurigas min. Por rediri la malnovan ŝercon, mi certe ne volus esti membro de asocio, kiu elektas min prezidanto.

Tamen, preter la ŝerco, mi kredas, ke nia asocio devas trovi la kapablon paroli firme kaj klare al la ekstera mondo. Ni devas refariĝi movado por Esperanto kiel rimedo por protekti la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj. Ni devas iĝi speco de Amnestio Internacia en la kampo de lingvoj. La prioritatoj estos: informado, instruado kaj utiligo. Ne temas pri io revolucie nova, sed pri provo realigi en la praktiko tiujn sloganojn, jam utiligitajn de Lapenna kaj aliaj. La nura novaĵo eble estas la insistado pri apliado. Esperanto iĝos vera lingvo nur kiam troviĝos homoj, kiuj normale uzos ĝin por akiri varojn aŭ sciojn. La fakto, ke esperantistoj troviĝas ĉie en la mondo, devus faciligi tiun taskon.

Zamenhof, iam asertis ion tian. Ni bezonas multe da imagopovo por veni al strukturo, kiu ebligas la samnivelan kunestadon de landoj en tiom malsamaj evolu-fazoj. Mi fidus, ke la esperantistaro kiel kolektivo posedas tiun imagopovon.

**BE.** *Kion vi atendas de la brazila esperantistaro?*

**Corsetti.** Simple, ke ili plu disvastigu Esperanton tra Brazilo, kiel ili jam diligente faras, kaj ke ili iĝu laŭeble la punkto, el kiu oni helpas la movadon en la ceteraj landoj de centra kaj suda Ameriko. Estas en la intereso de brazilanoj mem, ke ekzistu fortaj movadoj en la najbaraj landoj. Mi kredas ke ili akceptos la defion.



# SOLIDARE

## ĈEROKA ESPERANTISTO N. I. SEKOJO ESTAS KONDAMNITA AL MORTO!

Jen la opinio de pastro Regan (neesperantisto), kiu regule vizitadas lin en la malliberejo. Tiu ĉi teksto origine aperis en la anglalingva libro *Frontier of Justice*, kiu kontribuas por abolicio de mortopuno.

Ekde aŭtuno 1994 mi regule vizitadas homon en la ĉelovico de la mortkondamnitaj en la Ŝtata Prizono San Quentin en Kalifornio. Nun ni estas firmaj amikoj. Mi konvinkiĝis, ke li estas absolute senkulpa pri ĉiuj krimoj, pro kiuj li estis akuzita kaj kondamnita. Lia nomo estas N. I. Sequoyah. Lia origino kiel indiana usonano estas ĉerokia (Chero-kee). Laŭ mia pritakso, li fakte estas politika malliberulo. Li plenkreskis en Tale-quah, Oklahomo, la urbo, kiu fariĝis la ĉefsidejo de la ĉerokia gento, post kiam prezidento Andrew Jackson devigis tiujn indianajn usonanojn vojaĝi al Norda Karolino kaj Georgio laŭ vojo poste konata kiel la "pado de la larmoj" en la 1830aj jaroj. Tie Sequoyah spertis ne nur la eblon, sed la veron de antaŭjuĝoj. Post dekjara servado (kun honoro) en la usona mararmeo, li pluvis laborante kiel paca aktivulo por egalaj rajtoj por ĉiuj indiĝenaj popoloj. Li eĉ fariĝis bone konata kaj rimarkinde flua esperanto-parolanto. Lin altiris la pruvita kapablo de la internacia Esperanto-movado krei unuecon kaj pacon inter naciecoj kaj rasoj per tiu neŭtrala ponto-lingvo. Kiel sekvo de tiuj aktivecoj Sequoyah fariĝis tiom suspektinda, ke dum internaciaj vojaĝoj oni ofte haltigis lin ĉe landlimoj laŭ instrukcioj de usonaj sekretaj servoj. En 1984 kaj 1985 Sequoyah fondis, en Svisio, UNAP (Unuiĝintaj Nacioj de Aŭtonomaj Popoloj). Kiam li revenis en Usonon, oni arestis lin en operacio, kiu evidentiĝis esti klasika Cointelpro (Counter Intelligence Program = Kontraŭspiona Programo). Oni atribuis al li multajn nesolvitajn krimojn. Internaciaj agentejoj laborantaj por justeco por politikaj malliberuloj ekaktivis por li. Ili inkluzivas la svisan sekcion de Amnestio Internacia kaj Incomindos (Svis-germana akronimo por la usonaj indianoj). Incomindos proklamis la senkulpecon de Sequoyah kaj ke ĝi subtenas lin, politikan malliberulon. Tian proklamon faris tiu organizo por nur du indiĝenaj usonanoj, Leonard Peltier kaj N. I. Sequoyah.

La maniero de nia renkontiĝo estis jena: laŭ mia peto, la Subtena Projekto por Mortkondamnitaj en Liberty Mills, Indianio, sendis al mi nomon, ĉar mi pensis, ke esti korespondanto, plum-amiko de iu mortkondamnito estus eta ago montranta, eĉ se nur al mi mem, la sincerecon de mia konvinkiĝo, ke mortigi estas nejuste. Punkto! Estis hazardo, ke la ricevita nomo apartenas al homo, kies ekzekuto estus pura maljusteco pro la senkulpeco de Sequoyah. (*El Sennaciulo, februaro 1999*)



**MORTOPUNO  
NENIAM ! NENIE !!**